
Ekspozician enkondukon li prezentis pri *Ernst Schomer*, jam menciita pro priŜulca medalo. La teksto aperis en 1989 kajere en Mindeno. En recenzoj Ŝulco ofte simpatie pritraktis la ilustraĵojn de la libro, ekzemple ankaŭ la miajn en "Bestareto" kaj "Momentoj el eterno".

### Fino

Por fini, mi elektu bildon pentritan de Rikardo Ŝulco, kiun ne multaj Esperantistoj vidis, eble jam malaperintan postmorte: Portreto, pendinta ĉe li hejme, montras la scienciston teologon *Teilhard de Chardin*. Ĝi aludas la vivokoncepton de ambaŭ: ili taksis tiun ĉi surTeran vivon nur transira. Kiel skribis jam la apostolo: "Tie ĉi ni nur vidas kvazaŭ tra spegulo, sed tie ni vidos de vizaĝo al vizaĝo." Eble Rikardo Ŝulco konsciis, ke dumvive ja la racia rezonado validas, sed postvive la senpera vidado elmontriĝos la kvintesenco de la vivo.



### Apendico

Ŝulca memportreto (maldekstre)

Foje Rikardo Ŝulco desegnis / pentris sin mem. La desegnaĵoj aspektas pli vivoveraj ol la sola postrestinta pentraĵo.

**Adreso de la aŭtorino**

*Rita RÖSSLER-BUCKEL*
*Am Mönchsbusch 6*
*DE – 67373 Dudenhofen* / Germanio

**Priaŭtora informo**

Muzikinstruistino, docentino, pentristino, Esperantistino
<rozsas@web.de>



## Publikigaĵoj de ŜULCO Rikardo

### – libroj, kajeroj, flugfolioj – *

*Hermann BEHRMANN*

***Aus des Kopffüßlers Reich*** *(25 Antes-Karikaturen von Franziskus im Schnoor), Verlag H.M. Hauschild GmbH, Bremen,* 1972, 34 p.

***Mein geliebtes Esperanto* / Mia amata Esperanto** (4-a eldono), Eldonejo *Bleicher*, 1989, 244 paĝoj. (1-a eld.: 1976, 2-a eld.: 1978, 3-a eld: 1984)

***'ne ältere Dame aus Preetz*** (333 *Limericks*), Eld. *Bleicher*, 1977, 108 p.

***Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus***, Eld. *Bleicher*, 1979, 256 p.

**La perdita honoro de iu Katarino Blum'** (*Heinrich Böll* / traduko), Eld. *Bleicher*, 1978, 154 p.

***Europa und Esperanto*** (prelego), Eld. *Bleicher*, 1980, 11 p.

**Pendumilaj lidoj** (Morgenŝterno Kristjano / traduko), Eld. *Bleicher*, 1980, 108 p.

**Palmŝtrojmo** (Morgenŝterno Kristjano / traduko), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1983, 182 p.

**La trombonoj de Jeriko / *Die Posaunen von Jericho*** (dulingva eldono), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1984, 68 p.

**Vespero jam farigis** (agregaĵoj kaj robajoj), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1985, 128 p.

**Pledo por unueca lingvo** (Esperantologiaj eseoj kaj artikoloj), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1985, 287 p.

***Was nun Esperanto betrifft...*** (*Festschrift zum 80. Geburtstag*), Eld. *Bleicher*, 1986, 245p.

**Amuza Legado pri Til' Strigospegul'** (Boto Hermano / traduko), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1987, 376 p.

**Sur la vojoj de la Analiza skolo** (Esperantologia esearo), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1987, 279 p.

* Ĉiuj Ŝulcaj libroj (se ne elĉerpitaj) estas mendeblaj ĉe Libro-Servo *L.F.v.Wunsch-Rolshoven*, EsperantoLand e.V.,Wiclefstr. 9, DE – 10551 B e r l i n / Germanio
Tel. +49 - 30 - 6 85 58 31, Telekopiilo +49 - 30 - 68 05 70 11

**Vestfalujaj Flugfolioj** (monataj; aperis 96 numeroj ĝis 1987), Esperanto-Centro *Paderborn*, 382 p.

***Abyssos*** / **Abismo** (24 sonetoj en la Germana kaj Esperanta lingvoj pri 24 akompanantaj litografaĵoj de Lajpo Ĵano / *Hans Leip*), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1988, 78 p.

**Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj** (ĉirkaŭ 9000 Esperantigitaj propraj nomoj, kompilitaj kun Bermano Hermano), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1989, 141 p.

**La mago** (agregaĵoj kaj pantunetoj), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1989, 213 p.

***Einfach ein Maler*** (pri *Ernst Schomer*), *, 1989, 12 p.

**La esenco de la Analiza skolo** (3-a eldono), *, 1991, 11 p.

**La sesa regulo** (du volumoj + Solvaro), *, 1991, 120 p.

**Banalaj historioj** (Ĉerskjo Aleksandro / traduko), Eld. *Bleicher*, 1991, 168 p.

**Pirono Klaŭdo kaj la malbona lingvo**, *, 1992, 28 p.

**La Analiza skolo antaŭ la Maloveca tribunalo**, *, 1991, 35 p.

**Per mirigaj aventuroj piprita vojaĝo Rusujon de la barono Fonmunkhaŭzo** (Burgjero Godfredo Aŭgusto / traduko), *, 1992, 32 p.

**La vunda punkto** (1. Publika letero al la antaŭparolinto de la Nova Esperanta Krestomatio, 2. Esperantologiaj konsideroj pri eraraj kaj erarigaj Esperantologiaj konceptoj), *, 1992, 32 p.

**La lingvo internacia esence estas konvencio**, *, 1993, 11 p.

**La muzino**, Esperanto-Centro *Paderborn*, 1992, 528 p.

**La ora libreto pri "maĵorio" kaj *Bernhard Golden***, *, 1993, 23 p.

**Pri la absoluta malneceso mortigi la Akademion**, *, 3a eld., 1991, 42 p

**La viro en la luno** (legolibro), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1994, 400 p.

***Werbung muß sein***, *, 1995, 24 p.

**Ĉirkaŭ la skolo Analiza** (lasta libro), Esperanto-Centro *Paderborn*, 1997, 477 p.

**Adreso de la kompilinto**
*Hermann* BEHRMANN
*Schevenstr. 12 b*
*DE – 01326 – Dresden*
Germanio

**Priaŭtora informo**
Instruisto. Multjara estro de la Esperanto-Centro *Paderborn*. Eldonisto de Ŝulcaj verkoj, de "Speciala Cirkulero" kaj la broŝur-kolekto "Flava Serio". Esperantisto.

* Broŝuroj (laŭ Analiza Skolo) el la "SERIO FLAVA" de la Esperanto-Centro *Paderborn*.



# Mimoo, aŭtoro de la Analiza Skolo

*F.-G. RÖSSLER & K.-H. SCHÄFFER*

Ludoviko Mimoo (*Luís Mimó Espinalt*) naskiĝis en 1913 kaj mortis en 1986. Li loĝis en Katalunujo. Li ne multon sciigis pri si mem. Kiel Esperantisto, li atentigis, ke la Fundamento de Esperanto estas la leĝo, laŭ kiu la lingvo disvolviĝu science, logike, unuece. Li estas la iniciatinto de la Skolo Analiza, kiun Rikardo Ŝulco diskonigis kaj klarigis.

## Verkoj de Ludoviko Mimoo

Verkoj prilingvaj:

Perfekteco de la Esperantaj verboj; Barcelono 1961

Decidaj argumentoj; Barcelono 1963

Kompleta lernolibro de regula Esperanto; *Sabadell* 1973

Esperanto por la jaroj du mil; *Sabadell* (s.j.)

Kompleta lernolibro de regula Esperanto; Paderborno 1989

Vortaro Hispana-Esperanta (ms.)

Tradukoj:

*Soldevila*, Du komedioj; *Sabadell* 1975

*Zorrilla*, Don Juan' Tenorio; *Ascoli Piceno* 1981

*Perez Galdós*, *Doña Perfekta* (romano / ms.)

Plurfoje Ŝulco skribis pri Mimoo kaj liaj eltrovoj:

1. ekzemple en **Vestfaliaj Flugfolioj** n-ro 88 (1986/10) post 'Vortoj de Ludoviko Mimoo' kiel 'Rimarkoj de la kompilinto':

"Ludoviko Mimoo, tute individue, tute solece, sisteme, esploris Esperanton dum multaj jaroj de sia vivo. Li esploris ĝin kaj eltrovis regulojn ne nur pri la subpropoziciaj verboj, sed ankaŭ pri la kondicionalo, la vortfarado kaj pri la plej nekonataj partoj de la lingvo, no-

**4.** Vortoj de Ludoviko Mimoo en **Perfekteco de la Esperantaj verboj** (1961):

"La verkon de d-ro Zamenhofo, la Internacian Lingvon, oni adjektivis ĉiam "genia". Tio ŝajnas bombastado de entuziasmuloj, se oni konsideras, ke la dek ses reguloj de la Fundamento estis entenataj en broŝureto, ne en plurvoluma filologia verkego; sed la Fundamento estis kiel semo aŭ embrio, kiuj havas en si ĝerme ĉiujn ecojn necesajn al plenkreska estaĵo. Jen kial la vorto "genia" estas plene adekvata.

Zamenhofo kreis per elementoj naturaj, vivaj, lingvon logikan kaj genie simplan. Kaj la semo fariĝis arbego, kaj Esperanto altiris grandajn homojn kaj fariĝis senkompara lingvo, kiu nun havas vastegan vortaron kun relative malmulte da radikoj; lingvo, kies vortfarado estas regata de normoj simplaj kaj precizaj; kies gramatiko estas pura harmonio, kies literaturo, proza kaj poezia, estas trezoro, kaj kies fonetiko estas muziko.

Oni povas argumenti, ke tiu aŭ alia dirmaniero jam fariĝis tradicia, sed estas evidente, ke la logiko nepre devas rangi super la kutimo en lingvo origine arta, kiu en sia fundamento estas ideale racia, kaj en kiu mallogikaĵoj ĉiam devas esti konceptataj kiel koruptaĵoj".

**5.** … en **Esperanto por la jaroj du mil**:

"Centjara tradicio ne sanktigas, nek sankcias eraron. Logiko estas la fundamento de la Fundamento de Esperanto".

**Adresoj de la aŭtoroj**

*Franz-Georg RÖSSLER*
*Am Mönchsbusch 6*
*DE – 67373 Dudenhofen*
Germanio
<rozsas@web.de>

*Karl-Heinz SCHÄFFER*
*Schulstrasse 17*
*DE – 73432 Aalen -Unterkochen*
Germanio
<k.h.schaeffer@t-online.de>



# *Teilhard de Chardin*, sciencisto kaj profeto

*Roderic McDERMOTT*

Franca aristokrato, pastro jezuita, brankardisto neskuebla en batalo, eminenta paleontologo – ĉiu faceto tamen apartenas al nedividebla tutaĵo, ĉar *Pierre TEILHARD DE CHARDIN* (1881-1955) estis tiu maloftulo, homo plene integriĝinta. Lia unueco devenis de tutkore fidela respondo al unika dia voko. Multaj konvinkiĝis, ke temas pri nenio alia ol vokiĝo vere profeta por la Eklezio de nia tempo.

## Duobla signifo

La signifo de *Teilhard de Chardin* ŝajnas al mi duobla. Unue, li defias kredantojn egale kun nekredantoj en la sfero de ideoj. Kiel pastro-sciencisto li multe suferis pro la daŭra milito (jen malvarma, jen varmega) inter scienco kaj Eklezio. Li dediĉis sian vivon al la tasko akordigi la veron de scienco kun la vero de kristana revelacio. Pli ĝuste, li profunde rekonis, ke ekzistas nur unu vero, nome Dio mem, en kiu ĉiu homa vero (ĉu religia, ĉu scienca, ĉu alia) trovas sian originon.

Konvinkite de la masiva argumentaro favore al biologia evoluado, li nek perdis siajn nervojn nek pridubis (kiel kelkaj kristanoj) la honestajn motivojn de kun-sciencistoj. En la kadro de evoluanta mondo, kontraŭe, li trovis la krean agadon de Dio nemezureble pli kompleksa kaj grandioza ol la kristanoj ĝis tiam supozis. Poste, kun esplorista aŭdaco, *Teilhard* komencis antaŭkalkuli la estontan direkton de la homara evoluo. Ne plu fizika ĝi estos, laŭ lia konkludo, sed spirite, en direkto al ĉiam pli perfekta harmonio kaj socia unuiĝo.

Li argumentis, ke la homaro nun kapablas respondeci pri sia propra evoluo – kun risko, kompreneble, de katastrofaj mispaŝoj. Sed li restis optimisma. Vere spirita unuiĝo ja eblos, spite al ĉiu obstaklo, ĉar Kristo mem, enirinte nian mondon kiel homo, jam koncentras kvazaŭ de interne la evoluprocezon. La Kosma Kristo samtempe estas "Omega Punkto" – celpunkto al kiu la tuta evoluprocezo altiriĝas, kaj en kiu sola ĝi plenumiĝos.

Due, *Teilhard de Chardin* heredigis al ni novajn, tre kuraĝigajn perspektivojn por la spirita vivo. Li forte imponas al la leganto per sia esperplena spirito, substrekante ĉiam la pozitivajn kvalitojn de la mondo kaj de la homaro, prefere ol la negativajn. Li ja plene konsciis la realecon de la malbono, sed en la fina analizo lia fido al Dio, Kreanto kaj Savanto, subtenis lian optimisman sintenon.

## Kontaĝa optimismo

La kontaĝa optimismo de *Teilhard* servas por korekti la negativan tendencon de tro da kristanoj, kiuj, por tiel diri, rezignis pri la "sekulara" mondo (de urĝa homa fortostreĉo) favore al mallarĝa, introverta formo de pieco. En "La Dia Medio" (*Le milieu divine*) *Teilhard* insistas, ke kristanoj akceptu la mondon kaj ĉiun homan taskon kiel kreitajn de Dio kaj sankciitajn de Kristo. Li petas nin vidi la tutan homan fortostreĉon kiel bonan per si mem, ĉu temas pri politiko, scienca esplorado, komerdaco, mastrumado aŭ iu ajn alia laŭleĝa okupo. Plene partopreni en la homara tasko superege plenvaloras, ĉar Dio atendas min "de la pinto de mia plumo, mia fosilo, mia broso, mia kudrilo – mia koro kaj mia penso". Apenaŭ necesas emfazi, ĝis kia grado ĉi tiu teilharda sinteno respeguliĝas en la tre pozitiva dokumento "*Gaudium et Spes*" (pri Eklezio kaj nuntempa mondo) de la Dua Vatikana Koncilio.

## Nur postmorte

*Pierre Teilhard de Chardin* estis profeto ankaŭ en tio, ke el eklezia vidpunkto li vivis kaj mortis preskaŭ sen honoro. Sciencistaj laŭroj abundis, sed liaj originalaj opinioj (kaj, konfesinde, lia kelkfoja neprecizeco de esprimo, ĉar li ne estis profesia teologo) profunde alarmis ekleziajn cenzuristojn. Nur postmorte liaj nun famaj verkoj povis eldoniĝi. Taŭgas do kompletigi la nunan skizon per kompensa mesaĝo de Kardinalo *Casaroli*, sendita, en la nomo de Johano Paŭlo la Dua, al la Katolika Instituto en Parizo: "*Teilhard* havis potencan, poezian intuicion pri la valoro de la naturo, stimulan percepton de la dinastioj de la kreitaro, vastegan vizion de mondevoluo ligitan kun nekontestebla religia fervoro. La miriga eĥo de lia esplorado, kune kun lia radianta personeco kaj riĉa pensado, metis neforgeseblan stampon sur nian epokon".

(el: "Espero Katolika", jarkolekto 82, n-ro 770, septembro 1985, p. 150-151)



# Miaj rilatoj kun Rikardo Ŝulco

*Karl-Heinz* SCHÄFFER

Jam kiel juna adepto de Esperanto, post la jaro 1979, mi konatiĝis kun la artikoloj de iu *Richard Schulz*. Per siaj Vestfalujaj Flugfolioj (laŭ sia loĝloko *Minden*/Vestfalujo) li celis atentigi la Esperantistaron, ke la Esperantistoj faras grandajn erarojn: nenecesaj neologismoj kaj aliaj ŝanĝoj de la konciza Zamenhofa Esperanto gvidos nepre kaj tre rapide al dialektoj de Esperanto. Pro tio ĝi estonte ne povos resti "la internacia komprenilo", ĉar esceptoj, modlaĵoj, piĝiniĝo kaj nenecesaj neologismoj en Esperanto tute forviŝus la diferencojn al aliaj, naciaj lingvoj, kiuj ĉiuj ĝis tiam ja ne sukcesis solvi la babelturan kaj mondan lingvoproblemon.

Ŝulco Rikardo apogis sin sur la verko de la Hispano *Luis Espinalt Mimó*, kiu jam pli frue atentigis, kiom da lingvaj eraroj intertempe jam enpenetris Esperanton. Mimoo pledis por sobra analiza maniero de la Fundamento de Esperanto, kaj tial li fondis la Analizan Skolon, kies celo estis kaj estas, ke oni estu tre atenta pri la Fundamento kaj evitu modlaĵojn, kie ili estas evitendaj.

En la sama tempo mia Esperanto-instruisto atentigis min 1980 al unu el la libroj de Ŝulco, nome "Mia amata Esperanto". Per tiu poŝlibro la aŭtoro tute konvinkis min pri Esperanto. En 1985 mi legis la libron "Pledo por unueca lingvo". Nekredeble estis por mi siatempe (kiam mi kun ruĝaj vangoj trastudis la unuan ĝis lastan paĝon), ke mi enigis dum nur malmultaj tagoj la tutan gramatikon fervore kaj libervole. Mi komprenis, ke la Lingvo Internacia nepre estu stabila, firma, nevaria sur sia Fundamento perfekta en sia simpleco, por ke ĝi ne disdialektiĝu nek degeneru sub influo de modlemaj tendencoj aŭ de tradiciaj aŭ alilingvaj miskutimoj, ke oni devus kontribui al la perfektigo de Esperanto per severa, scienca analizado. Tio estas la plej grava kaj konstanta tasko por la gvidaj Esperantistoj laŭ Ŝulco. Kaj mi ek de tiam estas adepto de la Analiza Skolo.

La unuan fojon persone mi vidis Rikardon Ŝulco en la jaro 1985 dum la 70-a Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgsburgo. Tie li

prelegis i.a. pri la ĝusta apliko de ata/ita, kaj lia prelego poste ricevis longan aplaŭdon. Kelkaj aŭskultantoj esprimis en la sekva diskuto, ke ili nur nun komprenis, kaj ke al ili la aplikado de ata/anta kaj ita/inta ne plu kaŭzos lingvajn malfacilaĵojn.

Intertempe, kiel prezidanto de Esperanto-Grupo *Aalen* (EGA), la personaj kaj amikaj rilatoj firmiĝis okaze de libroprezentado de la "Banalaj historioj" de Aleksandro Ĉerskjo, kiun Ŝulco majstre tradukis el la Germana. En la ĉeesto de la urbestro de Aleno kaj de proksimume 100 interesatoj mi povis reprezenti publike Ŝulcon Rikardon samatempe kun la eldonisto *Heinz Max Bleicher*. Kulmino estis, kiam la tradukinto mem legis du ĉapitrojn el sia nova libro al la ĉeestanta publiko. Jam 1993 ni revidis Ŝulcon en Aleno, ĉar li estis la FAME-premiito en tiu ĉi jaro (krom *Bruno Vogelmann*). La solena festo forte emociis la tutan 130-personan ĉeestantaron.

Tempo forpasis kaj alvenis, la 12-a de Julio 1996, la tago de la 90-jariĝo de profesoro Ŝulco. Li estis invitinta nur la plej aktivajn subtenantojn de sia laciga laboro. Jam estis senteble, ke la aĝo postulos pli kaj pli sian kontribuon, ankaŭ de nia jubileanto. Li loĝis nun kun sia edzino en la t.n. rezidejo "*Porta Westfalica*" por maljunuloj rande de Mindeno, kaj forpasis en sia 92-a vivojaro la 26-an de Oktobro 1997. Bedaŭrinde neniu ricevis aktualan informon pri lia neatendita morto. Pro tio la Esperantistoj, kiuj lin ŝatis, ne povis doni al li la lastan honoron dum entombigo.

Rikardo Ŝulco estis por mi patreca amiko, honesta, sincera homo, kiu ofte devis suferi pro senindulgaj, akraj, malhonorigaj, detruemaj, ja eĉ malsamideanecaj atakoj de personoj, kiuj ne povis aŭ ne volis kompreni, ke li defendas la bazan kodon kaj esencon de la Zamenhofa elpensaĵo. Sed intertempe pli kaj pli da Esperantistoj aplikas tion, pri kio li atentigis multajn jarojn.

**Adreso de la aŭtoro**
*Karl-Heinz SCHÄFFER*
*Schulstrasse 17*
*DE – 73432 Aalen-Unterkochen* / Germanio
<kh.schaeffer@t-online.de>

**Priaŭtora informo**
Apotekisto. Dumviva membro en la Internacia Sciencista Kolegio de AIS. Estro de Esperanto-Grupo Alena. Bibliotekisto kaj afergvidanto de la Germana Esperanto-Biblioteko *Aalen*. Esperantisto.



# Rikardo Ŝulco kaj la muziko

*Franz-Georg RÖSSLER*

## Enkonduko

La multaflankaj interesoj de Rikardo Ŝulco kondukis lin ankaŭ al la muziko. Jam junaaĝe li tre ŝatis danci. En biografio li nomis sin interalie "tangodancisto". Li frekventis koncertojn kaj operoprezentadojn, tradukis el ties tekstoj. Aŭtodidakte li lernis ludi la bekfluton. Kiel tekstoaŭtoro li havis kontaktojn kun komponistoj. En Franclingva poemo li konstatis: *"Je joue mem de la flûte, pourtant ne suis pas musicien"* ("Mi ludas la fluton, tamen mi ne estas muzikisto"). Sed: *"Musique me ravit, c'est clair."* ("Estas klare, ke muziko min ravas").

Certe ne konscie, sed tute nature ligiĝis en lia persono la antikva nedisigebla kunestado de la vorto kun la muziko. Pro tio li disponis pri altagrada konscio pri lingvaj/muzikaj takto kaj akcento.

En lia informa/instrua/distra serio "Vestfaliaj Flugfolioj", kiuj atingis la nombron de preskaŭ cento, Rikardo Ŝulco foje enmetis popolkantojn ne nur tekste, sed ankaŭ muziknote. Same okazis ankaŭ en la libro "La muzino". Kaj ne nur popolecajn muzikaĵojn li enigis en siajn librojn, sed ankaŭ melodiojn verkitajn aparte por liaj tekstoj.

Estas interese, ke Rikardo Ŝulco nerare pensis muzikece, kiam li inventis poeziajn formojn. Aparte la variadon li regis majstre. Longajn ĉenojn da poemoj aŭ tradukoj li evoluigis el kerno, transformis, kiel faris klasikismaj komponistoj, malnovajn ideojn en aktualajn, konservante la malnovan formon. Tie ĉi li proksimiĝis evidente al muzikaj strukturoj.

## Muzika dosiero

Rikardo Ŝulco donacis al ni dum nia lasta vizito sian (ne tre dikan) dosieron kun siaj muziknotoj. Ili konsistas el kajeroj por bekfluto(j), inter ili komencantoliteraturo same kiel evoluintaj sonatoj. Estas interese, ke inter la muzikaĵoj por bekfluto troviĝas aktualaj muziknotoj

el jena reenkonduka tempo de la bekfluto en la tridekaj jaroj, tiam avangardaj, ekzemple de *Wolfgang Fortner*, kaj unu el la plej fruaj novaj lerniloj por tiu ĉi instrumentofamilio, tiu de *Gofferje*.

Estas supozeble (kaj laŭ lia iama diro certe), ke la lingvulo Ŝulco ne akiris altan gradon de kompetenteco je la bekfluto. Sed li amis la ludadon kaj aprezis ties efikon al lia personeco. En la Germanlingva poemo *Zwölf Töne nur* (Nur dek du tonoj) evidente li ne aludas la "dodekafonian" (dekdutonan) muziksistemon de *Arnold Schönberg*, sed melodion, kiu iam impresegis lin. Kaj li konfesas (tie ĉi laŭ la lasta verso en senrima adaptado): "Mi flutas tiun melodion ree / kaj aŭskultetas, kiam ĝi forsonas, / kaj fine mi demetas mian fluton, / skuite pro travivo de la formo." Ke la flutoludado estis por Ŝulco multe pli ol nura ludo, pruvas ankaŭ poemo en "Vespero jam fariĝis":

"Mi amas mian fluton. / Ludante ĝin mi festas.
Per ĝi mi ja pri mia / vivvolo manifestas."

## Felicitino Kukuko *(Felicitas Kukuck)*

Apud la kajeroj por la bekfluto troviĝas manskribe muzikaĵoj de la komponistino *Felicitas Kukuck* (1914-2001), Hamburganino, kun kiu Rikardo Ŝulco flegis bonan kontakton kaj kun kiu li efektivigis plurajn tekstajn-muzikajn projektojn. Ŝi, iama studento de *Paul Hindemith* (1895-1963, cetere unu el miaj komponistaj idoloj tiuĉitempe), estis verkinta melodion en diversaj variaĵoj por liaj limerikoj, aperintaj en *"'ne ältere Dame aus Preetz"*. La melodio taŭgas por ĉiuj de la 333 Ŝulcaj specimenoj. La tekstoaŭtoro en sia instruo "Kiel oni faras limerikojn" prezentas kaj rekomendas jenan melodion tiel (Germanlingve): "La melodio senmaskigas senerare ĉiun rampantan, glitantan, peze tretantan, stumblantan, mispaŝantan forĵetindaĵon. Sole la saltanta, la ĝustamezure kuranta limeriko adaptiĝas al la melodio kaj permesas esti kantata laŭ ĝi."

Ŝulco pluraloke per menciado fieras, ke kelkaj el tiuj liaj limerikoj estis fariĝintaj tekstoj ("apud aliaj meditigaj kaj impertinentaj kantoj") por *"Konzert für Drehorgel und Gesang"* ("Koncerto por gurdo kaj kantovoĉo") de *Felicitas Kukuck*, aperinta vinildiske en *"Modern music records LP 20"* ĉirkaŭ la jaro 1970. Krom tiu ĉi melodio enestas ses Kukukaj kantoj laŭ Ŝulcaj tekstoj (vd. la apendicon). Enestas ankaŭ kelkaj manskribaj leteroj/komentoj de ties komponistino kaj du gazetartikoloj pri ŝi.



## Tekstoj por muziko

Ŝajnas esti, ke la limerikomelodion petis la tekstoaŭtoro flanke de la komponistino. Ĉe alia projekto estis inverse. Temas unuavide pri libreto kun la Ŝulca parafrazo de la unuaj ses ĉapitroj de la Biblia libro pri Josuo *"Die Posaunen von Jericho* / La trombonoj de Jeriko" en trofeo-kvaroj, kaj Esperante kaj en la Germana lingvo. Sed sur kvar aparte engluitaj flavaj folioj kun muziknotoj kaj klarigoj evidentiĝas, ke la rigora sama ritma vestaĵo de la versoj ŝuldiĝas al la postulo esti kantataj laŭ du samritmaj melodioj.

Tiuĉifoje Felicitino Kukuko estis petinta lin verki baladon por ŝiaj pliklerigaj muzikamatoraj grupoj por la kutima kulmina polonezo, longa komuna dancado, en la kastelo *Rothenfels* en la malsupra Frankonio. La komponistino finas sian aldonitan raporton tiel (en traduko de R. Ŝ.): "Mi do petis mian amikon Rikardo Ŝulco verki baladon. Tiun li sprite kaj lerte verkis, kaj baldaŭ poste je bela somervespero en Rotenfelzo laŭ la longa kaj serene serioza historio pri Josuo, polonezo estas danciĝinta. Tiam, akompanata de gitaro, kantis juna katolika sacerdoto, kaj la tuta granda dancistaro post ĉiu strofo ekkantis la refrenon."

Letero de *Kukuck* dorsflanke de la lidokomponaĵo *"Dieser dein Gott"* laŭ (tiam ankoraŭ) *Franziskus R. Schulz* ankaŭ atestas, ke Ŝulco rilate la muzikon tamen restis en amatora stato: Longe ŝi eksplikis iomete spican ritmon kaj malferme aldonis: "Mi spertis, ke la plej multaj muzikaj laikoj vidas aŭ havas malfacilaĵojn en la kampo ritma, kvankam ne devus esti". Kaj estas evidente, kiun "laikon" ŝi aludas.

Tio ĉio okazis antaŭ la Ŝulca Esperanta vivofazo. Pri *Felicitas Kukuck* li poste omaĝis interalie almenaŭ per unu limeriko (vd. la apendicon). Kaj li enigis en la libron "La muzino" la baladeton "Anino la orfino" kun melodio kaj akompano, menciante "Teksto de ŜULCO Rikardo – Muzika kompono de KUKUKO Felicitino". (Vd. ankaŭ Apendicon II.)

## Tradukoj

La muzika sento de la poeto ebligis al li akurate reagi al la tekstaj bezonoj de la muziko, precipe por tradukoj al Esperanto. Aparte mi volas mencii la 28 tradukojn por lidokajero, kies tekstojn mi petis de li. Ekzistis jam antaŭe pluraj klasikaj lidotekstoj en Ŝulca traduko, sed multajn li nove kreis, laŭdire kun plezuro. Lertege li adaptis en-

havon, rimon kaj ritmon de la originaloj. Kvar aperis en la kompakta disko "Lida ludo" de *Jean Thierry von Büren* en Svislando, aliajn mi muzikis kun tiu tenoro en koncerto en *La Chaux-de-Fonds*, memkompreneble ofte ankaŭ kun mia edzino. Pluraj pliaj lidotekstaj tradukoj laŭ la tuta gamo de la klasika-romantika epoko aperis en "La muzino".

Ne nur la Germana lido estas traktita. Kiel romanisto Ŝulco bonege konis la Francan literaturon. Li tradukis sub la titolo "Romantika lido" *("Chanson / Lied")* kantotekston de Demjuseto Alfredo (1810 ĝis 1857) kaj aldonis plurajn proprajn variaĵojn en la Germana lingvo, kiel li kutimis fari jam antaŭ lia Esperanta epoko. Kaj certe estas pliaj aliaj tekstotradukoj el la Franca lingvo, taŭgaj por kantigo.

Aparta, ankaŭ persona rilato ekzistis al Lajpo Ĵano (*Johannes Leip)*, kiu estas traktitaj aparte en la referaĵo "Rikardo Ŝulco, la pentristo kaj grafikisto" de *Rita Rössler-Buckel*. Jena lingva kaj bilda verkisto forte influis Rikardon Ŝulcon. Memkompreneble li tradukis ankaŭ el liaj poemoj, redonitaj en "La muzino". Plej fama inter ili estas "Lil' Marlin' ", iom efemera produkto de Lajpo, tamen fariĝinta lia eterna sukceso.

Ankaŭ operaj tekstotradukoj el la Ŝulca plumo ekzistas, kvankam ne kompletaj aŭ sistemaj. Specimenoj prezentiĝas en "La muzino": "Rakonto pri Gralo" (laŭ Vagnero Rikardo (1813 ĝis 1883) el la opero "Lohengreno", 1850) kaj "Ho, kiom trompaj…" (laŭ Verdo Ĝuzepo (1813 ĝis 1901); kanzono de la duko el la opero "Rigoleto"). De Mocarto / Daponto en la menciita libro aperis "Donos la manon tie…" el "Sjor' Ĥuano", de Mocarto / Ŝikanedro "Arioj de Sarastro" kaj dueto al "La magia fluto" ("Papagino/Papageno"), de *Otto Nikolai* la drinkkanto de Falstafo el "La gajaj virinoj de Vindzo", de Ofenbaĥo Jakobo "Ario de la Spegulo" el "Rakontoj de Hofmano", de Bizeto Georgo "Ek al la batal'…" kaj "La amo venas de l' Ciganoj" el "Karmino", de Miljokero Karlo "La polino" el "La studento mizerulo".

Inter la tradukoj de Ŝulco troviĝas ankaŭ *"Rondelet"* ("Rondeto") de *Guillaume de Machaut*, sentema amokanto, kiun li tradukis el la frua Franca lingvo en la Germanan. Ŝulco rigardis la Francon certe kiel elstaran poeton. Ĉu li sciis, ke tiu, vivinte de ĉ. 1300 ĝis 1377, ne nur skribis tekstojn, sed apartenis al la plej famaj komponistoj tiutempaj (*"Ars nova"*), kaj ankaŭ proprajn tekstojn provizis per ofte tre arteca muziko?



## Muzikliteraturo

Krom pro kantotekstoj el diversaj stiloj kaj epokoj, la muziko foje rolis en aliaj tradukaĵoj Ŝulcaj. Plej ampleksa estas lia traduko de la poezia ciklo pri *Ludwig van Beethoven* "Antaŭ la naŭa ondo" de *Jiři Karen* en "La viro en la luno".

En tiu ĉi kadro ni almenaŭ aludu la fojan traktadon de la teoria flanko de la muziko en apartaj artikoloj. Ŝulco okupiĝis ekzemple en la eseeto "La kantebleco de lingvoj" pri la funkciado de Esperanto por kantaj celoj, komparante ĝin kun aliaj lingvoj. En "La sonoreco en la poezio kiel tradukada problemo" (en "La muzino") Ŝulco tre klare pruvas sian senton pri la muzikeco de la poezio. Rilate la tempostrukturon li klarigas: "Anstataŭ pri versomezuro oni povus ankaŭ paroli pri takto, sed ne, kiel ofte okazas, pri ritmo." Ke gravas por li ankaŭ la melodieco de poeziaj formoj, montriĝas en kelkaj tre informaj ilustraĵoj aldonitaj. En ili la deklamado aperas en desegna ekzekutado, kvazaŭ en poezia ĥoreografio. Tiaĵo jam okazis en la tempo de la Gregoria ĉanto, kiam oni ne konis muziknotojn, sed desegnis aeren melodiojn laŭ ilia moviĝo.

En tiu ĉi artikolo renkontiĝas tri artoj, nedisigeble kunligitaj: la vorto, la muziko, la bildo. Same okazas en la samalibra ĉapitro "La arto por la arto", kie Ŝulco unue prezentas la poemon *"L' Art"* de Gotjero Teofilo Franclingve, poste donas tradukon kaj plulaboron *"Die Kunst 117 Jahre später"* en la Germana kaj fine Esperantan tradukon "La arto". Jen sentiĝas ankaŭ iom el la ideaj fundoj kaj fontoj de Rikardo Ŝulco.

## Evoluo

Muzikhistorie ligita estas la Ŝulca nomo al la komponaĵo "Evoluo", kion mi komponis laŭmende de la *"Gesellschaft für Neue Musik"* ("Asocio por Nova muziko") en Manhejmo en la jaro 1991. Tiam mi nepre volis komponi Esperantan tekston kaj preferis sinjoron Ŝulco kiel aŭtoron. Lin mi petis kaj streĉe atendis lian tekston, ĉar mi lasis al li ĉian liberecon. Ĉu ĝi konvenus al miaj aspiroj? Venis la teksto "EVOLUO" kun sia akra kritiko de la nuntempa vivomaniero, sed en plej poezia tono. Ĝi inspiris min al komponado, kaj la kunlaboro sukcesis. La multavoĉa ĥora peco gajnis la unuan premion en la Germana Ĥora Konkurso (*Fulda* 1994) kaj aperis eldone kiel partituro kaj kiel kompakta disko – ambaŭ en eksterEsperanta medio…

Cetere, la ĥoranoj lernis la fremdlingvan tekston memstare laŭ mia skriba instruo kaj kantis ĝin senerare. Ke la prezentado de tiu ĉi malfacila peco ne nur estis devo por tiu ambicia ĥoro, montriĝis dek jarojn pli poste, kiam ĝi restudis ĝin sen ia devo por la 25-jara jubileo de la ensemblo. Ŝulco certe iam aŭskultis la pecon, sed bedaŭrinde mi ne scias aŭ ne memoras lian reagon.

Kaj dua cetero: En 1992 Rikardo Ŝulco enmetis tiun ĉi tekston German- kaj Esperantalingve en la volumon "La muzino". La antaŭjare sendita porkompona originalo estis alveninta nude, sen rimarkigoj. En la libra depresado Ŝulco aldonis al la Germana versio (!) la Espe-rantan dediĉon "Por ROJSLERO Franco-Georgo". Kaj en la Esperanta versio li ŝanĝis la lastan linion. Originale ĝi tekstas: "Ne malesperu ni, plu vivu...pene." Nun li eĉ turnas la enhavon en alian direkton: "Esperu ni! Kaj penu! Mutacie." Por la komponisto tiu tendenco devigus al tute alia fino de la peco. Por la tekstaŭtoro post jaro la unua versio aspektis certe tro pasiva, tro maldecidema. Kiel vera Esperantisto li ne povis resti ĉe jena solvo. Urĝis lin postuli (super)-homan, se ne Esperantistan energion, aktivan laboron, eĉ ŝanĝiĝon, en tiu ĉi evolua kunteksto: "mutacion". Tiam li estis 86-jara, travivinta jam multon malesperigan.

Komence de la 90-aj jaroj Rikardo Ŝulco transdonis al mi partituron de muzikigo de la Zamenhofa "La Espero" (intertempe la konata himno de la Esperantistoj) fare de la pola komponisto *Andrzej Koszewski*, kun la rekomendo kontakti lin. La komponisto neEsperantisto aprezis la fonetikajn eblecojn de la Lingvo internacia kaj inventis apartan modernstilan muzikan-tekstan teksaĵon por granda ĥoro. Ekestis korespondado kun li, en kiu li plendis, ke la peco ja akiris agnoskon en la pola medio, sed ne inter Esperantistoj. Pere de artikolo en MONATO almenaŭ mi provis atentigi la samideanojn pri tiu ĉi verko, kiun ankaŭ mi nur estis ekkoninta tra Rikardo Ŝulco.

## Komponaĵo

Kvankam Rikardo Ŝulco en 1969 (en la jam supre menciita Franclingva poema memportreto *"Les dadas du vieux retraité"* ("La ŝatokupoj de la maljuna retiriĝinto") konfesis, ke li ne scias komponi muzikon, ĝin nur ŝatas aŭskulti (*"Et quoique je ne sache rien / de l'art de composer musique / je l'aime l'entendre bien."*), li tamen iam provis muzike komponi. Estas tute nekonate inter la Esperantistoj, ke la lingvisto kaj lingva verkisto kreis almenaŭ unu "muzikan komponaĵon", nome muzikigon de la propra teksto *"PSALM"*, iam publike prezentita kaj aktuale postlasita en du preskaŭ identaj formoj inter liaj Germanlingvaj prespretaĵoj.



Por inicitoj la teksto jam aspektas tia, kiel en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj oni ŝatis prezenti "modernajn psalmojn", ekz. tiujn de la latinamerika "liberiga teologo" *Ernesto Cardenal*, cetere ekzemplon donanta personeco por Ŝulco. Komponisto povus efektoplene aranĝi la Ŝulcan psalmon laŭ jenaj modeloj. Sed jam la tekstaŭtoro mem instigis en komento al muzika prezentado. Li ne skribis muziknotojn aŭ liveris grafikan partituron, sed komunikis vorte siajn muzikajn ideojn. Ekzemple "Granda *Tutti*-ĥoro parolu la alvokojn, transirante el la parolata lingvo en kantatan lingvon. Aldoniĝu du malgrandaj ĥoroj por la aliaj alineoj. Transpontu modere frapinstrumentoj la partojn." Por la tempo kaj la granda formo li indikis: "La rapideco de la 'alvokoj' restu serioza kaj signifa, tiu de la 'kreaj ŝtupoj' akceliĝu laŭ la Bolero de *Ravel* ". Kaj memkonscie li aldonis: "La peco povas anstataŭi predikon aŭ prezentiĝu kune kun du aŭ tri aliaj pecoj pli grandaj en pure muzika koncerto." La teksto kun la komento troviĝas komplete, sed Germanlingve, en la libro "Rikardo Ŝulco. Dek jarojn poste" / *Edition Antiphon / Speyer* / 2007.

## Fino

Ĉu mi povis sekvi funde la muzikajn spurojn de Rikardo Ŝulco, ĉu mi estas trovinta ĉiujn? Pri tio mi ne povas esti tute certa, ĉar mi povis utiligi preskaŭ nur tion, kio postrestis en mia biblioteko kaj mia memoro. Sed ŝajnas al mi, ke la bildo ne konsiderinde ŝanĝiĝos, eĉ se troviĝos ankoraŭ lidotradukoj kaj eble melodioj de *Felicitas Kukuck*. Aparta branĉo tamen povus ekesti, se aliaj komponistoj estonte adoptos Ŝulcajn tekstojn por siaj komponaĵoj.

## Apendico I:

### Tekstaj-muzikaj rilatoj inter *Franz-Georg Rössler* kaj Rikardo Ŝulco

**1. Ŝulcaj tekstoj por muzikaĵoj de F.-G. R.:**

a) **Evoluo** (por kantato)
muziknotoj: *Tonger-Musikverlag Köln*
*kd: Valve Hearts / Köln /* 1996

b) **Nokto estas paca mar'** (lido)
muziknotoj: *Edition Antiphon / Speyer /* 2005

**c) La trombonoj de Jeriko** (polonezo)
muziknotoj: *Edition Antiphon / Speyer* / 2007
**d) *...und dennoch versuchen zu retten***
muziknotoj: *Edition Antiphon / Speyer* / 2007
**e) ...kaj tamen provadi la savon**
muziknotoj: *Edition Antiphon / Speyer* / 2007

**2. Artikoloj de F.-G. R. pri Ŝulcaj muziktekstoj**
(vd. ĉe "Rilatoj inter..." apendice de "Dediĉe al Rikardo Ŝulco, la mentoro kaj la amiko") en:
*Franz-Georg Rössler / Rita Rössler-Buckel*
**"Rikardo Ŝulco. Dek jarojn poste."**
*Edition Antiphon / Speyer* / 2007

**3. Lidoj en Esperanto / *Klavierlieder in Esperanto***
28 tradukaĵoj de Rikardo Ŝulco / eldono de F.-G. R.
muziknotoj: *Edition Antiphon / Speyer* / 2003

## Apendico II:

### Rilatoj Rikardo Ŝulco – *Felicitas Kukuck*

### 1. Limeriko pri *Felicitas Kukuck*:

| 95. | iela translingvigo: |
|---|---|
| *Es komponiert in Blankenese* | Komponas en Blankenezo |
| *Felicitas auf ihrer Chaise.* | Felicitino sur sia seĝo. |
| *Sie macht Kanons, Kantaten,* | Ŝi faras kanonojn, kantatojn, |
| *Menuette, Sonaten,* | menuetojn, sonatojn, |
| *und kaut dabei Rundstück mit Käse.* | dume maĉante fromaĝon. |

Ni ne scias, ĉu la tuj apuda limeriko rilatas la saman Felicitinon, ĉar en siaj klarigoj Ŝulco mencias iom nebule nur unu limerikon sub tiu ĉi kapvorto: "Tre idiliece bildigas la limeriko la vivadon de tiu ĉi vaste sola virino komponanta..."). Tamen, pro scienca kompleteco, tie ĉi ĝi ne estu prisilentita:

| 96. | iela translingvigo: |
|---|---|
| *Felicitas buddelt im Sande* | Ensable fosumas la Felicitin' |
| *in Norddorf auf Amrun am Strande,* | Amrune Norddorfe ĉestrande, |
| *und badet im Meer,* | kaj naĝas enmare, |
| *tollt dann tüchtig umher.* | moviĝas nerare, |
| *Nix oben, nix unten! O Schande!* | sed nude. Hontinde! Ho, kia virin'! |



### 2. Komponaĵoj de *Felicitas Kukuck* laŭ tekstoj de Rikardo Ŝulco en la aktujo donacita al *Rössler*:

1. La melodio al la limeriko laŭ diversaj prilaboradoj (melodio sola / kanto sola / kanto + piano)
2. *Mondlied* (Lunkanto), (melodio sola + piano / trivoĉa virina koruso)
3. *Der Mensch lebt nicht vom Brot allein* (La homo vivas ne nur de pano), (kanto sola)
4. *Zum Menschen allein wird durch Glauben der Mensch* (Sole per kredo la homo fariĝos homo), (kanto sola / melodio sola / trivoĉa miksita koruso)
5. *Dieser dein Gott* (Tiu ĉi – via Di'), (kanto sola / melodio sola / kanto + piano)
6. *Schokoladen-Josephine* (Ĉokolad-Jozefino), ("*Text* / Teksto: *Franz Iskus*") (kanto + piano / melodio sola)
7. *Einmal in St. Pauli* (Unufoje en Sanktpaŭlo), ("*Text* / Teksto: *Franz Iskus*") (kanto + akompanaĵo / melodio sola)

### 3. Komponaĵoj de *Felicitas Kukuck* laŭ tekstoj de Rikardo Ŝulco, enŝovitaj en Ŝulcaj libroj:

1. En "*'ne ältere Dame aus Preetz*" ("Dam' maljuneta el Preco"), (Eldonejo *Bleicher*): melodio por liaj limerikoj.
2. En "La muzino" (Esperanto-Centro Paderborno): "Anino la orfino": baladeto kun melodio kaj akompano.
3. En "La trombonoj de Jeriko": melodio por la polonezo.

**Adreso de la aŭtoro**
*RÖSSLER Franz-Georg*
*Am Mönchsbusch 6*
*D-67373 Dudenhofen* / Germanio

<rozsas@web.de>

**Priaŭtora informo**
Gimnazia instruisto. Verkas muzikaĵojn, tekstojn kaj bildojn. Esperantisto.

# POLONEZO

Melodio por multaj strofoj danceblaj

Teksto: balado "La trombonoj de Jeriko" de Rikardo Ŝulco

Kanto + akorda akompano

Franz-Georg Rössler




Kantisto kantas sola la multastrofan tekston.
Grupo (ankaŭ dancanta) ripetas la lasten versokvaronon (la du lastajn taktojn).

Por fini ripetu kune la unuajn du taktojn kun ties unuastrofaj tekstoj, eble per "Haleluja, haleluja."



## Scienca eĥo

### La plej grandaj haremoj

ĉe mamuloj troviĝas inter kelkaj foko-specioj. La maskloj defendas marbordajn sekciojn aŭ malgrandajn golfojn kontraŭ rivaloj. Tie ĉi ili pariĝas kun la femaloj, kiuj tie ankaŭ naskas la idojn. Rekordulo estas ursfoko-masklo, kiun oni malkovris sur la *Pribylow*-insuloj antaŭ Alasko. Ĝi estis amasiginta ĉirkaŭ si 161 femalojn. Ankaŭ la Nordaj Marelefantoj ĉirkaŭigas sin per abunda femala kompanio: dum la sezono la maskloj pariĝas kun 40 ĝis 50 femaloj, kaj tion plurfoje. La konkurenc-lukto kaj streso tamen estas senkompataj. Por fariĝi superrega masklo, marelefanto devas unue atingi aĝon de 8 aŭ 9 jaroj – tion kapablas nur unu el cent bestoj. Kaj se la vireca aĝo estas atingita, la domina masklo eltenos la daŭran interbatiĝon pri femaloj maksimume unu aŭ du jarojn. Ekzistas fakte pli malstresa formo de familia kunvivado. (2008-01-21)

### Ĝisosta ostomilito

La usonanoj *Edward Drinker Cope* (1840-1897) kaj *Othniel Charles Marsh (*1831-1899) estis pioniroj pri paleontologio, la scienco pri fosiliiĝintaj besto- kaj plantorestaĵoj. Ili konatiĝis unu kun la alia dum studado en Berlino/Germanujo. Komuna al ili estis la arda kaj senbrida pasio kolekti fosiliojn, tiam tute nova hobio. Sed ĝi por ambaŭ fariĝis vera vivotasko. Ree en Usono ili efektivigis – depende kaj komence en reciproka altestimo – elstarajn trovaĵojn de fosiliaj vertebruloj en Kansaso, poste ankaŭ en Utaho, Kolorado, Norda Dakoto kaj Montano. Sed baldaŭ la komuna strebado ŝanĝiĝis en akrajn konkurencbatalojn, kiuj famiĝis sub la nomo "ostomilitoj" (angle "*Bone Wars*"). La kaŭzo de tio estis verŝajne la Elasmosaŭro, iu de *Cope* malkovrita naĝanta saŭro kun ekstreme longa kolo kaj tre malgranda kapo. Dum la kunmetado de la skeleto *Cope* eraris kaj metis la kranion sur la vostoekstremaĵon. Kiam tion vidis *Marsh*, li plengorĝe ridis ĝis larmoverŝo. Li prefere ne estu farinta tion. Ĉar la eraro de *Cope* pri la Elasmosaŭro kaj la posta reago de *Marsh* malamike disigis la du esplorantojn, ambaŭ alte estimatajn membrojn de la Nacia Akademio de Scienco. Kiam *Marsh* malkovris saŭron 30 cm longan, *Cope* mallonge poste superatutis lin per 60 m longa fosili-besto. Kiam *Cope* referencis pri trovaĵo el la *Perm*-epoko (antaŭ 260 milionoj da jaroj), tiam *Marsh* rapide traserĉis siajn ostokestojn kaj prezentis, same el la permia tempo, la plej aĝan vertebrulan fosilion de la mon-

do. Kiam *Marsh* en 1882 estis nomata ĉefpaleontologo de la Geologia Mezurad-Oficejo en Vaŝingtono, li sonorilsignalis la sekvan boksistan raŭndon pri ostoj: li deklaris la fosili-kolekton de *Cope* nacia propraĵo kaj konfiskis ĝin. Sekvis koteca interbatalo en la gazetaro, dum kiu *Cope* sukcesis konsiderinde damaĝi la reputacion de *Marsh*. Finfine la t.n. ostomilitoj donis al la scienco kun la determinado de 1600 vertebrulfosiliaj specioj vastan sciencan bazon por pluaj esplorlaboroj – kaj por la du konfliktemaj kverelemuloj eternan famon. (2008-07-10)

## Banano bananoforma

Ĝi ĉiam aspektas same kaj ĉiam laŭguste samas – tamen ni ne volas malhavi nian bananon de la specio *Cavendish*. Ĝi estas la mondvaste ĝenerale komercata specio. Aktuale ĝi estas duoble endanĝerigita. En la Malaja arĥipelago, Indonezio kaj Aŭstralio jam tutaj plantejoj estas neniigitaj pro ŝimo kaŭzanta "Panamomalsano-speco-4", kiu infektas la radikojn de bananostaŭdoj. Pesticidoj tute ne helpas. La panamomalsano-speco-4 tamen ankoraŭ ne atingis Mezan Amerikon kaj Karibikon – nura afero de tempo – sed tie disvastiĝas jam la ŝimo "*Nigrasignatora*". Kun la *Cavendish*-pereo oni povas kalkuli en la daŭro de la sekvaj ok jaroj, ĉar tiu ĉi specio estas nur plantebla kiel markoto, do kiel klono. Ĉiuj provoj kruci posteulojn ĝis nun malsukcesis. Tiu ĉi problemo jam antaŭe okazis. En 1960 ŝimo neniigis la tiam dominantan specon *Grosmichel*. Maljunuloj certe memoras, ke la tiamaj bananoj estis pli dolĉaj. Kaj la sekva unuforma-unuspeca-unugusta banano? (2008-08-11)

## Malfacila muŝkaptado

Muŝoj ne kapablas – kiel japanaj papilioj, abeloj kaj burdoj – movi siajn okulojn sendepende de la kapo. Tiun malavantaĝon ili egalige kompensas per ĉ. 5000 malgrandaj ĉelarforme aranĝitaj okuloj, nomataj facetaj aŭ kompleksaj okuloj, kiuj kunmetas la bildon mozaike el rigardopunktoj. Tiu bildo ne estas tre preciza, sed, anstataŭe, donas tre rapidan diseriĝadon. Dum homo perceptas malpli ol po 24 bildojn en sekundo kiel "apartan movofazon" (do kvazaŭ kiel unuopan bil--don), la muŝo kapablas po 200 bildojn en sekundo. Spekti filmon estas por muŝo kvazaŭ diapozitiv-prezentado, kaj nian kaptontan manon ili vidas alveni al si en lantmova rapideco. Oni do devas esti tre lerta kaj rapidega por resti sub la muŝa reagotempo. (2007-11-06)


# Scienca Revuo Vol. 59 (2008) (4) / n-ro 215

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Decembro 2008 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30*
*DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"


## Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ro David Kelso*<br>*5, Craigenhill Rd., Kilncadzow*<br>*GB – Carluke, ML8 4QT* | *<davidekelso@yahoo.co.uk>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara*<br>*Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**
**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**


***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***

# Originalaj artikoloj en Vol. 59 (jarkolekto 2008) de *Scienca Revuo*, paĝoj 1-236


## *SR n-ro* 212 Vol. 59 (2008)(1) *SR 1/2008* 1-56

***E. Dudich*** Ĉu sklavoj aŭ idoj de la Tero ni estas? – Historio de Gaia – ĉu gaja historio? – 4-14
***G. Schaumberg*** Novaj ekkonoj pri Coelurosauravus, la plej antikva flugkapabla vertebrulo 15-20
***H.H. Renemann*** Teorio pri menso. Kiel kaj per kio funkcias nia psiĥo? 21-36
***S. Stampa*** Novaj vojoj pri la apliko de kontraŭhelmintaĵoj 37-42
***R. Sachs*** Fokuson sur parazitologio 43-46

## *SR n-ro* 213 Vol. 59 (2008)(2) *SR 2/2008* 57-112

***R. Lewin*** Disvastiĝi kaj kanti 60
***G. Tucker*** Ĉu turkoj povas lerni Esperanton? 61-74
***D.E. Rogers*** Lvortaroj devus klare montri pasivigeblon 75-84
***H. Nagata*** Perceptita simileco de parolsonoj de Esperanto kaj aliaj kvin lingvoj ĉe japanlingvanoj 85-94
***N.A. Zoja*** Moskvanoj kaj francoj (laŭ la verkaro de *I.S. Ŝmelev*) 95-100
***S. Girdzijauskas, G. Garšva & E. Merkevičius*** Logistika regado de kreditoj 101-108

## *SR n-ro* 214 Vol. 59 (2008)(3) *SR 3/2008* 117-172

***E. Dudich*** Ĉu la estonto estas en niaj manoj? – Neretenebla evoluo kaj subtenebla disvolvo – 119-125
***W. Teles Pontes*** Intraspeciaj malsimilecoj de ĥemia profilo en seksa feromono de insektojoj 126-136
***D. Haĝiev*** Cbulgaraj inĝenieroj konstruis aŭtompbilan motoron, movatan per akvo 137-140
***O.A. Fischer*** Libeloj kiel interaj gastigantoj de parazitaj vermoj (trematodoj kaj cestodoj) 141-156
***R. Lewin*** Fekado kaj fekaĵo 156-160
***J.H. Jónsson*** Globoj en *n*-dimensiaj spacoj – Frandaj eroj por gimnazianoj – 161-165
***O. Savuchaeva*** Problemoj de sinkonscio en la romano «Mantiso» de *John Fowles* 166-170

## *SR n-ro* 215 Vol. 59 (2008)(4) *SR 4/2008* 173-236

***F.-G. Rössler*** Dediĉe al Rikardo Ŝulco 175-188
***R. Ŝulco***† Noto pri la scienceco de la Internacia Lingvo 189-194
***R. Sachs*** La juna Ŝulco 195-198
***R. Rössler-Buckel*** Rikardo Ŝulco, la pentristo kaj la grafikisto 199-212
***H. Behrmann*** Publikigaĵoj de Ŝulco Rikardo 213-214
***F.-G. Rössler & K.-H. Schäffer*** Mimoo, aŭtoro de la "Analiza Skolo" 215-220
***R. McDermott*** *Teilhard de Chardin,* sciencisto kaj profeto 221-222
***K.-H. Schäffer*** Miaj rilatoj kun Rikardo Ŝulco 223-224
***F.-G. Rössler*** Rikardo Ŝulco kaj la muziko 225-234